

En Genovo la 27.10.1782 naskiĝis N. P.

Lia nomo apartenas al nomoj kiel Mikael-Angelo, Mozart, Raffael, Goethe kaj pluaj. P. estas simbolo, en kiun enkorpiĝis ĉia ĉarmo de violon-ludo, simbolo, kiu ne povas esti superita.

Liaj gepatroj estis tre modest-devenaj: Lia patro en sia junaĝo estis haven-portisto, poste okupita en ŝipfarejo. Lia patrino, tre malriĉa, krom granda beleco havis kantistan talenton. La juna edzino sciis interpreti klarvoĉe ĉiun melodion parkere, ŝia edzo akompanadis ŝin je gitaro, krome iom li violonis. La duopo iradis vespere de gastejo al gastejo, Kaj tio estis profitdona.

La 27.10.1782 naskiĝis al ili filo kaj ricevis nomon Nikolao. Poste naskiĝis al ili ankoraŭ du knabinoj.

Foje li elserĉis violonon kaj komencis liaj unuaj provoj. Tutajn semajnojn sola. Post nelonge li sciis noti skribon, ĉiujn gamojn kaj akordojn, kaj elpensadis plej eblajn malfacilaĵojn. Por ke lia ludo estu ankoraŭ pli bona, lia patro alkondukis lin al majstro Ciacino Costa, membro de katedrala kapelo, al kiu necesis pagis. Costa pruntis al la knabo bonan violonon, kaj ne daŭris longe kaj la knabo devancis sian instruiston.

Lia patro estis pasia loteri-ludanto. Tial li estis al la knabo tre senkompata maljusta batadi lin, ankaŭ igis lin malsati. Sed Nikolao ne bezoni severan disciplinon. Li ekzercis ege diligende kaj ŝate. En nekredeble kurta tempo li kapablis ekzerci ĉian lernaĵon neordinaran liŝatis ludi nekonatajn akordojn, kaj la plej malfacilajn dutonojn. Krome li estis tre ambicia. Costa instruis lin pri harmonio, kaj kontrapunkto, Nikolao tion rapide ĉion perceptis, ke li komencis kompreni jam en sia oka jaro. Komponaĵojn de Corelto kaj Tartini jam tiam li ludis nesupereble bele kaj iĝis per tio fama en Genovo. Trifoje semajne li ludis en la katedralo kaj ricevadis por tio rekompencan. Sed ĉiujn enspezojn de la knabo enpoŝigadis la patro.

En Genovo P estis ofte invitata en domon de markizo Di Negro, por ludi antaŭ liaj gastoj. Fama franca violonisto kaj komponisto R. Kreutzen rakontas en siaj memuaroj, ke estinte invitata al la markizo, li aŭdis koncerton de la 13-jara Nikolao, kio lin plenigis de maksimuma mirego, pro la fantasta ludo. Lerteco de N. similis al diabla sorĉado. Jen la unua atesto de granda violon-majstro pri demona ludo de P.

La markizo rekomendis al la patro plej faman italan violoniston en Parmo, Rotto. Do N. ekiris al Parmo. Sed unue li venis al Florenco, kie li ludis en pluaj muzik-rondoj kaj pro sia arto li vekis senliman admiron.

Majstro Rotto rifuzis instrui P-n. Mi mem ne ludus pli bone mian koncerton. Plua majstro Païen ŝate instruis P-n, ĉar lin fascinis lia genia talento.

Ankaŭ ĉe Parma kortego oni atentis P-n. Tie dum akompano de kortega orkestro li ludis konĉerton de Violli; oni disponigis al P. kortegan teatron, li ludis tiom sorĉe, ke la koncerton li devis ripeti post kelkaj tagoj.

Famo pri lia artista perfekteco disvastiĝis en la tuta norda Italio kaj P. koncertis en Milano, Bolonjo, Florenco, antaŭ reveno al Genovo. Lia avara patro volis akiri de sia filo kiel eble pleje da mono, fermadis lin, malsatigadis. Kaj tio nepre ne necesis. P. ludis kvazaŭ obsedita, ludis 10 horojn tage; elpensadis maksimume malfacilajn akordojn, jam superis ĉiujn tiutepajn virtuozojn kaj ekzercis plur-akordan ludon.

En sia 17a jaro li ellernis ĉion; sed krome li ekkonis, ke violono kaŝas sekreton, kiun nwniu sciis kaj kiun li studis. Tiam li estis tre bela junulo, alta, svelta, krispa hararo kaj fajraj okuloj. Krome li sopiris pri amo ĉe virinoj kaj post la patro heredis pasion al hazardludoj. Jen kaŭzo por elgliti el la potenco de la patro. Kaj en la jaro 1800 sekrete li fuĝis, kaŝadis sin en ia itala urbo kaj plej fervore preparadis sin por koncerta turneo. El multaj urboj venadis invitoj al koncertoj kaj P enspezadis multe da mono.

En ĉiu eĉ negranda itala urbo estis kazino, multaj elitaj sinjoroj, havantaj belan edzinon, profitadis el tio. Ili akceptadis gastojn, post vespermanĝo zorgis por ebligi hazardan ludon, mastrino de la domo kun siaj amikinoj allogadis. Tiam vere ĉie svarmis belaj kantistinoj, dancistinoj, aktorinoj, facilmoraj virinoj, do okazoj por fole ĝui la vivon. P ĵetiĝis en ĉi tiun fluan kaj pro sia malsperto kaj pro siaj grandaj enspezoj de virtuozo, li estis ĉiam sopirata.

P koncertis en la norda Italio kaj profitis grandegajn sumojn. Sed ĉu logis lin bakaratejoj, baldaŭ li ekkonis ŝanĝiĝemon de la viv-feliĉo en la plej amara formo. Pro sia beleco kaj sorĉa ludo li iradis de aventuro al aventuro, kio kompreneble influis lian poŝon.

Tiutempe li vojaĝis al Livorno, li estis rekomendita al angla konsulo, kiu kiu akceptis lin tre flate. Sed dirigento de la loka orkestro estis ofendita, ĉar P ne estis rekomendita al li, kaj ne permesis al siaj muzikistoj akompani la ludon de P. La salono estis plenplena kaj tiam vekigis en P **artista** ambicio. Li alpaŝis al ramplo, improvizis solon kaj montris tian arton, ke la publiko restis senspira, eĉ komencis ploreti. P komencis ĝis nun sekretigian arton de akordoj en flaĝoletoj, picikatoj kaj tiel li ludis 3 horojn kaj rikoltis surdigan aplaŭdon.

La dirigento tre pentis kaj luis proprakoste urban teatron por plua koncerto de P. Sed tiu malgajnis en bakaratejo ĉion, eĉ sian violonon. Tion sciigis muzik-amanto **Liaron** kaj proponis al li kvameri-violonon, laŭdire pli bonan ol violono de Stradivari.

P. superis sin mem, la violono sonis kiel orgeno, superis plenan orkestron eĉ dum fortisimo. Kiam P. ekkonis kvaliton de la instrumento li aldonis kelkajn freneze artismajn komponaĵojn kaj kiam la koncerto finiĝis, L. alpaŝis al li: kvarneri-violono estas via, sed promesu al mi, ke neniu plu ludos sur ĝi. P. promesis kaj post lia morto la violono restis en muzeo.

En la jaro 180, P konata en la tuta Italio kiel fama artisto, malaperis senspure por la publiko, dum 4 jaroj li kaŝadis sin. Sed jam ni scias, ke pasie li enamiĝis al juna belega vidvino (Simo Dida), havanta kastelon apud Pizo. Ŝi studis gitaron, P. ankaŭ konis tiun instrumenton, atingis virtuozecon, sian amatinon li akompanadis kaj komponis 6 majstrajn sonatojn por violono kaj gitaro. Poste ili disiris. P denove aperis kaj koncertis. Sed nun entuziasmo de aŭskultantoj gradiĝis ĝis frenezado, lia arto estis tute nekomparebla al la homoj kaj oni komencis sence fabeli, ke li alianciĝis kun diablo. Kiel violonisto li estis por unuj mistera geniulo, por aliaj horora sorĉisto. Lian arton neniu sciis imiti (Novtempe eĉ ne Jehuda Menuhin).

Jam li ne sidadis en en bakaratejoj, nome li havis tre amarajn spertojn, ofte li restis sen monero en poŝo. Li komencis ŝpari, eble eĉ tre.

En urbo Luka li iĝis kortega kamera solo-violonisto. Al li enamiĝis vere belega princino Eliza, fratino de Napoleono kaj P. iĝis ŝia amanto favorata. Sed li devoligiĝis nur por 3 jaroj. Sed finance la posteno ne estis profitdona. Sed la **amado** lin lacigadis, neniam li povis koncerti en aliaj lokoj, krome li enamiĝis al alia kortega damo. Princino Eliza, por venĝi, foje ordonis al li komponi konĉerton nur g-korda. Kaj vere, P aperis sur podio kun violono kaj nur 1 kordo kaj anoncis: Sonato por 1 kordo. Tio estis senkompara triumfo. Ĝis nun ŝajnis neeble ludi akordojn sur unu kordo duoblajn oktavojn. Sed P kapablis tion fari.

Ekde la jaro 1814 dum 15 jaroj P mirigadis la tutan Italion. En Bolonjo li konatiĝis kaj amikiĝis kun Rossini.

Antaŭ forveturo fremdlanden P 38 foje koncertis en Milano, poste sekvis 140 koncertoj en la ceteraj partoj de Italio. P sciis ĉiujn klasikajn opusojn, sed ĉar ĉiu estis por li tro facila, li ludis siajn komponaĵojn.

Tiam estis tre ŝatataj konkursoj kun aliaj grandaj violonistoj, tio estis granda modo.

Lafont aŭdis kaj estis konvinkita, ke P estas ĉarlatano kaj volis lin forbalai.

Kaj en la jaro 1816 okazis en Milano koncert-konkurso inter P kaj tiu Lafont. Ankaŭ li same venkis super pola virtuoza rivalo Lipinski. P renkontiĝis kun germana violonisto **Lud. Sproni**. Sed Spr. ne parolis pri P. bele, li nomis lin ĉarlatano. Sed ĉiuj ceteraj kritikistoj nepre malkonsentis.

En Romo li malmulte koncertis, sed multe komponis. Aperis ĉe li tuberkulozo de gorgo, sed li resaniĝis. P intencis verki novan metodon de violon-ludo. Sed ne realigis ĝin. Grandega domaĝo, ĉar sian solan lernanton **Kamilon Sivori** li instruis apenaŭ unu jaron kaj S estis opiniata unu el la plej bonaj violonistoj tiutempaj. P atingis aĝon, kiam viroj devas pensi pri estonteco kaj eskapi antaŭ la soleca vivo de maljuna fraŭlo.

Li konatiĝis en Venecio kun ĉarma ĥoristino Antonia Bianthá. Ŝi ne havis ian talenton, sed P. instruis ŝin kanti kaj post duonjaro ŝi kantis la plej malfacilajn ariojn. Li vivis kun ŝi tutan jaron, estis al ŝi treege donacema, aĉetadis al ŝi plej altkostajn tualetojn, juvelojn. Li estis feliĉega, kiam naskiĝis al ŝi filo Aĥilo, kiun P jam de naskiĝo adoris. Sed ŝi tute ŝanĝiĝis. Ŝi fariĝis kapricema,

koketa, pretendema, ĉiujn enspezojn li devis al ŝi transdonadi. Ŝi koncertis kun li kiel kantistino kaj havis grandajn sukcesojn kaj grandan aplaŭdon. Kaj nun la netalenta ĥoristino estis kalumniata, oni parolis pri la geedza duopo, ke ŝi fordonis sin al nigra magio. Tio kompreneble estis maljustaĵo.

P ne edziĝis al ŝi (kaj tial estis proklamita je li anatemo). Antonia estis obsedita pri juveloj kaj tualetoj, krome ŝi estis netolereble ĵaluza. P povis nenion ŝpari. Krome lia patro ŝtelis de li 100.000 lirojn kaj krome li devis zorgi pri la patrino kaj fratino. P iĝis morna, introversa, timema. Al kio kontribuis teruraj kvereloj, kiujn ŝi malbonvole kaŭzis. P ĉion toleris pro la eta Aĥilo, kaj ŝi eluzadis tion kaj tute lin subpremadis.

P estis ekipita fiziologie, nekredebla elasteco de artikoj, perfekta aŭdosento, dum la lastaj jaroj pasigitaj en Italio. 1925-22 li ŝanĝiĝis. Lia amatino estis disipema kaj senkora. Li devis multe perlabori, ĉiuj ŝparaĵoj malaperis. Restis al li nur zigzage vojaĝi tra la tuta Eŭropo, vivi en diliĝencoj, senĉese ekzerci, rezigni je ĉiuj amikaroj, havi ĉirkaŭ si nenion, krom solecon en hoteloj, plenplenaj koncerthaloj, surdigan jubladon, malsanigan atmosferon. En la lastaj jaroj li ŝatis solecan vojaĝadon, nur kun pianisto, ofte li tranoktis en gastejoj, ofte ankaŭ en ia patricia domo, se okazis ia akcidento.

Antaŭ forveturo al Vieno P 3-foje koncertis en Napolo, kiuj laŭ vortoj de fama kritikisto vekis frenezajn jubladon.

En Vieno floris la violon-arto, tie la ludon kulturis fratoj P+C Vranicky, majstro Helmesberger, Mayseder, Schuppanzier, Clemond. Franz Sch., kiu aŭdis P opiniis koncerton de P kiel sian plej grandan viv-travivaĵon (mi aŭdis kanti anĝelon).

Meze de marto 1828 alveturis P en Vienon. Lia sorĉo komenciĝis per la unua arĉ-tiro. En grandioza elano tondris fajreraj pasaĝoj, akordoj, arpeĝoj sonantaj kiel harpo, efektoj, tute novaj tonoj, kiuj tute restis enigmaj por ekspertoj. Liaj flaĝoletojen akordo efikis kiel artfajraĵo. Ĉiu estis akceptata kun freneza jubilo. En Vieno li donis 20 koncertojn. Ĉio en Vieno estis à la Paganini: bulkoj (en formo de violono), menuoj, biskvitoj, poŝtukoj, bombonujoj.

Vieno estis por P grava, ĉar solviĝis lia rilato al Bienĥi. Ŝi konsentis forvojaĝi en Italion, ricevis kelkmil guldenojn, krome plurajn milojn por filo Aĥilo, je kiu ŝi rezignis kaj keome P sekurigis ŝin per alta rento.

Al P restis kara knabeto, kiun li adoris. Li mem lin lavadis, vestadis kaj amis super ĉio kaj ĉiam li vojaĝis kun la knabo.

Sanstato de P ne estis la plej bona, P kuracis sin ĉe fama viena kuracisto kaj laŭ lia rekomendo P kuracis sin en K.V.

Poste li havis 6 koncertojn en Prago. Sekvis Dresdono, grandega sukceso, sekvis Berlino, tujtute li akiris senmezuran favoron de la berlina publiko, kritikistoj estis senkonsilaj.

P kapablas neblaĵojn!

Sekvis grandegaj sukcesoj en Varsovio (10 konc.), Poznan, Vratislav (Purkyně) **inundo** en Prusio, en pluaj 20 germanaj urboj, en Nurenbergo li ludis Venecian karnavalon dum grandega jublado.

Frankfurto iĝis lia dumtempa restadejo.

Oni miregis pri lia nekomprenebla provo, per kiu li regis sian instrumenton. P sciis meze de ludo fulmrapide reakordi ĉiujn kordojn, ke la publiko nenion observi kaj tonoj estis absolute neta. Neniu kapablis ion similan. Uzado de flaĝoletoj apartenis al lia plej brila arto, li ampleksigis violonludon ĝis neeble. Grandaj tiutempaj muzikistoj Schuman, Wagner, Liszt, Chopin (kiu ĉeestis ĉiujn liajn 10 koncertojn en Varsovio) estis entuziasmitaj.

Poste subite li decidiĝis por Parizo, kiu tiam estis politika kaj artisma centro de Eŭropo, kie loĝis plej grandaj muzikistoj, de literaturistoj: Hugo, Alf. de Musset, Dumas, Balzac, Vigny, Sue.

P serĉis konvenan koncert-halon. Li luis Grandan Operon; en liberaj vesperoj li klopodis ĝui muzikon kaj art-travivaĵojn de Parizo.

La 8.3.1831 koncertis P en Nacia Teatro de Parizo. Ĝi estis neforgesebla evento en analoj de la Reĝa muzika akademio. Tuj la sekvintan tagon P estis la ĉefa persono de Parizo. P komponis por Parizo koncĉerton D-dur. Supro de la arto, neniam plu atingos lin. Oni skbis: Ĉi tie limiĝas arto, komenciĝas sorĉado." Goethe: lin aŭdi – erupcianta vulkano, **nadar lumor** – Liaj komponaĵoj, lia

arto superas la homan komprenon. Liaj soloj estas sentive multformaj. Aŭdis lin Liszt, kiu apartenis al liaj plej **endaj** admirantoj.

Malgraŭ tio, ke en Parizo furiozis ĥolero, la koncerthaloj plenegis, enspezoj grandegaj, centmilaj.

Sekvis Londono. Granda honorario, kiun li postulis, vekis indignon ĉe gazetaroj kaj ĝi strebis kaŭzi malamikan etoson kontraŭ li. Sed la publiko tion ne atentis, sukcesoj estis ŝtormaj.

Liaj koncertoj estis fajraj artfajraĵoj, lia "Rondo-danco de sorĉistinoj" estis vere opiniata diabla, P estis pasie salutata. Grandegajn sukcesojn li rikoltis en Irlando. Tiam li aĉetis al si tre komfortan kaj luksan vojaĝ-kaleŝon. (P ekde sia 20-a jaro estis persekutata de malsanoj: ofte li devis fasti, lia junaĝo estis dura, lia patro igis lin malsati, kio estis kaŭzo de lia magreco. Plurfoje li malsanis je pulmito, martire li malsanis je gorĝo, ofte li ne povis paroli.)

En Parizo li donadis beneficiajn koncertojn favore al viktimoj de ĥolero, en Prusio favore al granda inundo. Beneficiaj koncerto favore al malriĉuloj en Parizo.

Pluaj lin pripalpadis por konvinkiĝi, ĉu vere li estas estaĵo el karno kaj sango. (sekvo de korpa konstitucio).

Inter amikoj ĉiam gaja kaj sprita, atingi la plej nekredebla (ne esti tuberkuloza, tusado – nerva feblo).

El Londono en Parizon, kie li pasigis malsana kelkajn monatojn. Lia knabo Aĥilo zorgis pri li kun emocia infana amo kaj eĉ nokte vartis lin.

P post Parizo planis grandegan turneon tra Belgio. Sed tie renkontis lin malsukceso. Kulpis en la bigota lando kolera malamo, klerikala propagando kontraŭ tiu "inferulo", "satano". Poste oni bedaŭris en Belgio la krudan konspiron kontraŭ genia artisto, impetaj polemikoj kaj la klerikala partio rikoltis, kion ĝi semis.

P aĉetis vilaon apud Parmo kaj establis ĝin kun maksimuma lukso. Tien P invitadis elitajn tavolojn al grandaj festenoj kaj koncertis por bonfaraj celoj.

P apartenis al adorantoj de Berlioz, vera genio de franca muziko. Sed B malsukcesis, li preskaŭ kolapsis, fakte lia sano ruiniĝis. Tamen fama dirigento Habeneck aranĝis koncerton, en kiu oni ludis nur opusojn de Berlioz. P estis inter aŭskultantoj kaj kaj kisis lian manon, kaj transdonis al li honoran donacon de 20.000 frankoj. Donaco de P ŝanĝis la vivon de Berlioz – Li pagis ŝuldojn, povis establi sian loĝejon kaj edziĝi al Henrieta Smitson, komponi simfonion Romeo kaj Julia kaj dediĉi al P.

P forveturis al la suda Francio. Li sopiris pri la suno kaj varmo. Ne havis feliĉon je doktoroj. Tre ofte kuracis lin ĉarlatanoj. Lia malforteco kreskis, manĝado kaŭzis al li grandajn dolorojn, manĝis kiel limako, tute ne povis paroli. Lia filo estis senlaca kaj afabla fleganto (15 jara). La 27.5.1840 post terura spasma tusado P mortis en aĝo de 57 jaroj, 7 monatoj.

P testamentis 8 violonojn al violonistoj Bérít, Lipinski, Bulle, Vienptemp ...

Li postlasis preskaŭ 2 milionojn da liroj, universala heredanto estis lia filo Aĥilo, liaj fratinoj renton po 75 kaj 50 mil. Eklezio rifuzis kristanan sepulton. Lia granda malamiko episkopo en Nice, ke li estis ateisto, ne iradis en preĝejon.

Parencoj de P insistis, sed Genova kardinalo konfirmis decidon de la episkopo en Nice. Lia korpo restis en la vilao, poste lokita en kelo de la vilao, poste en kadavrejo. La nica episkopo asertis, ke P estis herezulo. Poste guberniestro kaj grafo de Nico protestis kontraŭ la episkopo.

Aĥilo P. faris ĉion por atingi kristanan sepulton por sia patro. Post vanaj protestoj kontraŭ la genova arkiepiskopo li veturis al Romo, en aŭdienco ĉe papo li petis revizion. La papo nuligis la episkopajn ediktojn, instalas komisionon, kies decidiĝo ne estas konata.

La korpo de P estis 3 foje **xxxx**. Sed Sed ĉar siatempe Maria Luisa P. nomumis kavaliro de sankta Georgo, do Aĥilo atingis ĉe la papo permeson sepulti la patron kiel kavaliro de sanktgeorga ordeno kun ĉiuj ceremonioj ekleziaj, sed sen pompo, kiel estis ordonite.

Estis rifuzata al li rajto je la lasta ripozo, kiun P tiam meritis.

140 jaroj pasis de la morto de granda violonisto.

Li ne havas sekvanton, neniu lin superos.

Genovo gamo devanci lernaĵo flaĝoleto koncerto x koncĕrto obsedi ramplo bakarateĵo donacema pref. ol malavara morna introversa arpeĝo arĉo-tiro kaleŝo benefico kaprico x kapriĉo

**Rimarkigo:**

*La prelegon prezentis Josef Vondroušek en la Esperantista klubo en Brno 15.5.1990 sub titolo "Memoro al Nicolo Paganini". La manuskripto (skribita vere per mano) estis trovita en postlasaĵo de Zdeněk Hršel en decembro 2019, kiam ties filo Jan Hršel transdonis al M. Malovec 10 skatolojn kun diversaj materialoj de la patro. La transkribo povas esti iom erara, ne ĉio estis bone legebla, precipe ne propraj nomoj de la tiamaj personuloj. Josef Vondroušek havis ankaŭ pli frue prelegon pri Paganini: "24.5.1960 Nicolo Paganini, kiu el violono elsorĉis diecajn melodiojn". La manskribaĵo estis skribita sur dorsa flanko de la kluba bulteno el 1989, tial ni scias, ke temas pri la prelego el la jaro 1990. J. Vondroušek verŝajne parolis parkere, la teksto servis nur kiel rimarkigoj, tial ili estas en kelkaj lokoj iomete konfuzaj, nur la preleganto mem sciis, kion li volis diri. Malgraŭ tio ĝi estas valora atesto pri la prelegaj programoj en la E-klubo de Brno.(Miroslav Malovec, 10.12.2019)*